

Babilada rondo

... okazos je la 19-a, vendrede ...

la 9-an de januaro

ĉe Charlotte Blanc Maillard

Avenue Nestlé 7, Vevey

021 922 34 74 / 079 393 32 63



la 12-an de januaro

ĉe M.-A. kaj Knud Sunier

Av. des Alpes 150, Montreux

021 961 38 56 / 079 210 97 75



la 6-an de februaro

ĉe François Randin

Vallombreuse 14, Lausanne

021 647 29 28 / 076 411 14 55



Ne forgesu aliĝi ĉe:

<http://doodle.com/bk4pd6ivx6efq4m5#>

Citaĵoj ĉirkaŭ la vero

Pro la malforto de niaj sentoj,
ni estas senpovaj por
diferencigi la veron.

Anaxagore

Se oni devas ĉiam diri la veron
al la klientaro, ne eblas negoci.

M. Pagnol

La vero estas kiel la suno: ĝi
ĉion vidigas kaj ne lasas sin
rigardi.

Viktor Hugo

La vero estas tio, kio simpligas
la mondon kaj kio ne kreas la
ĥaoson.

Saint-Exupéry

La historia vero ofte estas
interkonsentita fabelo.

Napoléon

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

www.facebook.com/societedesperanto.lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte

Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin *

076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Laŭzana Esperanto-Societo

Informilo

januaro 2015 - n° 1

Lunde, la 5-an de januaro 2015

je la 20-a, ĉe la unua etaĝo
de la laŭzana stacidoma bufedo

**Ni spektos
kelkajn filmojn de
DANNIR & NANDIR**

Lunde la 2-an de februaro

Ĝenerala asembleo ordinara

Lunde la 2-an de marto

Decidota

Lunde la 6-an de aprilo

Decidota

Lunde la 2-an de majo

Decidota



La tri Magoj

Tiuj personoj, kiuj nomiĝas « la Tri Reĝoj » aŭ « la Tri Magoj » estas elvokitaj nur en la Matea Evangelio.

Laŭ la tradicio ili alvenis el Oriento kaj vojaĝis ĝis Bet-Leĥemo gviditaj per stelo.

Fine de la 13a jarcento Jacques de Voragine proponis tiun interpreton en « la Ora Legendo » kaj priskribis portreton de la tri magoj tiel :

« La unua el la Magoj nomiĝis Melkioro ; li estis maljuna, blankhara kaj longbarba. Li donacis oron al la Sinjoro, kvazaŭ al sia reĝo, la oro signifante la Kristreĝecon.

La dua, nomiĝinta Gasparo, juna, senbarba, ruĝkolora, donacis al Jesuo per la incenso omaĝon al lia Dieco.

La tria, nigrvisaĝa, portante barbegojn, nomiĝis Baltazaro. La mirho, kiu estis en liaj manoj rememoris, ke la Filo mortos."

El : <http://www.gralon.net/>

Lasta konsilo

La monaĥestrino de eta mezlernejo en Irlando, naŭdekokjaraĝa, mortanta kuŝas sur sia lito.

Ĉiuj monaĥinoj staras tie por akompani ŝin al ŝia lasta vojaĝo. Oni donas al ŝi iomete da varmeta lakto, kion ŝi rifuzas, ĉar sengusta.

Unu el la monaĥinoj reiras al la kuirejo, ĉar ŝi rememoras pri Irlanda viskio en la kelo. Ŝi verŝas ĝin en grandan tason kaj enverŝas dozegon da lakto en ĝin. Ŝi revenas al la estrino kaj portas la tason al ŝiaj lipoj.

La monaĥestrino trinkas gluton, kaj alian, kaj finfine malplenigas la tason.

La monaĥinoj, trankviligitaj, fine demandas al ŝi bonan kaj saĝan konsilon antaŭ ol ŝi mortos.

La monaĥestrino, per lasta fortostreĉo, provas sidiĝi kaj diras :
"ĉefe neniam vendu tiun bovinon !"

Zamenhofa festo

Kiel kutime nia grupo festis la naskiĝdatrevenon de L. L. Zamenhof. Sabate la 13-an de decembro ni unue renkontiĝis en la nova salono de la Unuiĝo de la Laŭzanaj Societoj. Tie ni kantis kelkajn esperantajn melodiojn, sekvante la parolojn sur la televidilo. Nia vicprezentino legis tekston pri la loko, kiun la angla lingvo rabis sur la Esperanta... Ni trinkis aperitivan preparitan de simpatiaj membrinoj. Poste ni tagmanĝis tre bonan fonduon en la restoracio "La Naŭtiko". La etoso estis afablega kaj gajega.

